

L'esperanto

Revo de Itala Esperanto-Federacio

Rivista inviata in abbonamento agli associati FEI (vedasi p.2)
 Prezzo di un singolo numero 2 € per l'Italia 3 € per l'Estero



**A Mazara del Vallo
 un altro congresso di successo**



ISSN 1974-9147



9 771974 914006

12005



Vojaĝo al Vjetnamujo

Manuela Ronco
 pagina 3

Vojaĝo al Vjetnamujo (2)

Michael Boris Mandirola
 pagina 5

PIV finfine enretigita

Daniele Binaghi
 pagina 7

Prezidento sarai tu...

Renato Corsetti
 pagina 9

Esperanto per negati (2)

Pier Luigi Cinquantini
 pagina 11

Mazara del Vallo

Liba Gabaldi
 pagina 12

Ancora Mazara del Vallo

Amerigo Iannacone
 pagina 13

EKO-KULTURA

Vladimir Soroka
 pagina 17

ENKONDUKO

Pro kelkaj ŝanĝoj en la sidejo de nia asocio vi certe rimarkis ke la lastaj numeroj de la revuo atingis vin kun strangaj malfruoj kaj oftcoj. Nun ĉio devus esti stabiliĝinta kaj espereble la situacio pliboniĝos.

En ĉi tiu numero vi povos legi diversajn raportojn pri la plej gravaj ĉiujaraj eventoj: la Universala Kongreso kaj nia Nacia Kongreso. Se oni iomete plikoncentriĝas evidentas la avantaĝo diplomiĝi trigrade pri Esperanto: du el la junaj diplomitoj Manuela Ronco kaj Michael Boris Mandirola povis partopreni en Kongresoj en la fora Vjetnamujo senpage. Ĉu ĝi ne estas forta argumento por allogi junulon al la lernado aŭ al pluprogreso en la studado de nia lingvo? Kiu meza junulo povus nun vojaĝi al tia lando sen la elspezo de tre grava sumo? Do ĉi-foje vi legos iliajn impresojn pri tia sperto.

Kiel jam dirite vi legos ankaŭ pri la spertoj de aliaj partoprenantoj en pli modesta kongreso (la nia), sed certe ne mapli sukcesa. Eble la plej fora kaj malpli facile atingebla loko ĝis nun (laŭ la vidpunkto de centritalo). Krom la kutimaj rubrikoj pri lingvo kaj interreto, indas citi Novan Senton kie oni povas malkovri ke la nova "fenomeno" de la itala politiko, Beppe Grillo, favoras Esperanton. Do estontaj eblaj liaj voĉodontoj, inter esperantistoj, havos kroman kialon.

Nu, pardonpetante pri la malregulaĵoj en la apero de la revuo, mi deziras fruktodonan legadon.

Pier Luigi Cinquntini

Direttore Responsabile e Redattore
Leĝe Respondeca Direktoro kaj
Redaktoro:
Pier Luigi CINQUANTINI
via Dante Alighieri, 2, I-01010 Blera
tel.0761 479 503 - revuo@esperanto.it

Amministrazione - Administrejo:
FEI - Via Villorosi, 38 - I 20143 Milano
tel/fax 02 5810 0857 - fei@esperanto.it
http://www.esperanto.it
C.F.80095770014

C. C. Postali - Poŝtkontoj:
C.C. postale FEI: n.37312204
IBAN: IT940076010160000037312204
C. C. postale FEI libri (per l'acquisto di libri): n.54614524
IBAN: IT11K076010160000054614524

C. C. Bancario - Bankkonto:
Banca Intesa - S.Paolo, Ag.002 Milano
IBAN: IT06A0306909446000003625562 -
BIC:BCITITMM432
Conto UEA - UEA-Konto: iefa-p

Comitato Esecutivo FEI - IEF-Plenuma
Komitato:
Aldo GRASSINI, presidente
Renato CORSETTI, vicepresidente
Laura BRAZZABENI, segretario generale
Francesco MAURELLI, cassiere
Davide ASTORI
Brunetto CASINI
Michael Boris MANDIROLA

Publicazione riservata agli Associati.
Quote associative 2011 (comprehensive di
€ 10 dell'abbonamento alla rivista, per
tutti gli associati tranne gli Associati
Familiari)
Associato ordinario € 28,00
Associato sostenitore € 84,00
Associato garante € 280,00
Associato fino a 25 anni € 14,00
Associato familiare € 14,00
Iscrizioni presso i gruppi locali oppure
direttamente presso l'amministrazione
FEI.

La Gioventù Esperantista Italiana (IEJ) è
la sezione giovanile della FEI e ne fanno
parte gli Associati fino all'età di 30 anni.
La IEJ cura la redazione della rubrica
"Nova Sento" che compare in questa
rivista.

Registrazione al Tribunale di Milano n.85
del 27 febbraio 1970.
Stampa: Tipografia Agnesotti - Str.
Tuscanese km 1,700 - 01100 Viterbo -
Tel.0761 251 025
Progetto grafico - Grafika ideo
Federica Ursig - Davide Amadei

In copertina: I Kajto durante il concerto a
Mazara del Vallo. (Foto Ranieri Clerici)

MOVADO

Vojaĝo al Vjetnamujo

Manuela Ronco



La aŭtorino salutas la kongresanojn nome de Itala Movado

Pli ol du monatoj pasis ekde mia vojaĝo al Vjetnamujo, kaj mi ankoraŭ ne povas pensi pri ĝi ne sentante en la koro multe da emocio kaj iom da sopiro, ĉar tio estis sendube unu el la plej intensaj kaj neforgeseblaj spertoj de mia vivo ĝis nun. De kiam mi eksciis, ke mi gajnis la konkurson Marelli, kaj do mi partoprenos en la 97a

Universala Kongreso en Hanojo, mi estis tre ekscitita kaj scivolema. Mi tutkore deziris tiun ĉi vojaĝon, al lando tiom malproksima kaj nekonata.

Mi neniam estis ekster Eŭropo antaŭe: verŝajne pro tio la kultura ŝoko alveninte en Azio estis komence tre forta. Fakte la ŝoko ne estis nur kultura, sed

ankaŭ, mi dirus, fizika. Mia korpo mem bezonis kelkajn tagojn por adaptiĝi al la ŝanĝo de horzono kaj al la tropika vetero, tiom varma kaj malseka. Mia gustosento ne tuj alkutimiĝis al la novaj manĝkutimoj kaj mi timis malsatmorti, pro netrovo de io apenaŭ manĝebla por mi. Mi timis ne travivi la lokan



La golfeto de Halong

trafikon, tiun teruran haoson de aŭtoj kaj ĉefe motorcikloj, veturantaj ŝajne sen ajna regulo. Mi kredis morti pro timo, kiam insektego nekonata vizitis mian hotelan ĉambron.

Sed iom post iom, dum la semajno, ĉio ekŝajnis pli kaj pli normala. Manĝi sidante sur etaj seĝoj surtrotuare iĝis amuza kaj plaĉa kutimo. Post kelkaj tagoj da peno, mi eĉ iĝis sufiĉe lerta pri la uzo de bastonetoj kiel manĝiloj, kaj malkovris diversajn bongustaĵojn. Mia korpo ĉesis suferi la varmegon, kaj mi reakiris miajn energiojn. Mi ne plu daŭre kun suspekto rigardis ĉirkaŭ mi.

Dume la kongreso disvolviĝis laŭtradicie, kun la kutimaj programeroj, sed iom aparta etoso, eble donita de la ekzotika medio kaj de la ĉeesto de multaj lokaj junuloj, kiuj kun granda entuziasmo kaj engaĝiĝo volontulis en la organizado.

La programo malfermiĝis kiel ĉiam per la Movada Foiro, kie landaj kaj fakaj asocioj prezentis sin, ofte omaĝante la

aliajn partoprenantojn per informiloj, donacetoj kaj frandaĵoj. Sekvan matenon estis la solena malfermo, kun eksibicio de lokaj artistoj, parolado de la prezidanto de UEA, Probal Daŝgupta, kanto de la himno, kaj salutoj de la landaj reprezentantoj. Mi fiere iris surscenejen por saluti la partoprenantaron nome de Itala E-Federacio kaj Itala E-Junularo. Estis dum la semajno Nacia Tago, dediĉita plene al la gastiga lando, Vjetnamujo, sekvis Kleriga Lundo, kursoj kaj ekzamenoj, prelegoj de la Akademio Internacia de Sciencoj, kaj pluraj kunsidoj. Mi aparte amuziĝis dum la kurso de la vjetnama lingvo, gvidita de la ĉarma Nepo, kiu pacience instruis al ni ne nur kelkajn utilajn frazojn, sed eĉ kanton. Ankaŭ la vesperojn estis programoj: nacia vespero, teatraĵoj, internacia arta vespero... Min surprizis la kongresa balo, kiu neatendite perdis sian tradicion solenecon por iĝi vera diskejo, kie ni freneze dancadis.

Dum la ekskursita tago mi estis en la Ninh Binh regiono, tre bela loko kie ni vizitis diversajn pagodojn, kaj ĝuis navigadon meze de rokoj kun mirinda vegetaĵaro, sur lignaj boatetoj stiritaj de remistoj kiuj remis per siaj piedoj.

Multon de la UK-a tempo mi ankaŭ dediĉis al TEJO-rilataj taskoj, ĉefe al la pretigado de la Internacia Junulara Kongreso, kiu estis okazonta la sekvan semajnon. La kunlaboro kun la vjetnama organiza teamo estis grava okazo por ekzerci interkulturan komunikadon, kio ne ĉiam estis facila, tamen donis al ni valoran kaj pliriĉigan sperton.

Per komunikado kaj malfermita kaj afabla sinteno, ni kune trovis solvon al multaj problemoj, kio kontribuis al la sukceso de la IJK, verŝajne ne perfekta, sed laŭ mia vidpunkto priferinda.

Al tio aldoniĝas la rilatoj kiuj naskiĝis en tiu mallonga sed tre intensa tempo kune: homoj antaŭe tiom fremdaj, kaj nun geamikoj, gefratoj. Certe distancoj malhelpas, kaj ni ĉiuj kun sopiro foriris. Reveninte, multaj bildoj (kaj en la interreto, kaj en la menso) aperas por esti rigardataj centfoje. Jen mi preleganta, jen mi ludanta, jen mi promenanta en la ĝangalo meze de simioj. Jen mi sur ŝipo, en buso, en diskejo, en bankedo. Jen mi kun vjetnamoj, brazilanoj, indonezianoj, japanoj, usonanoj, francoj, angloj, rusoj kaj poloj ...homoj kun homoj. Kaj tial mi pensas ke Esperanto rolis sian parton, ankoraŭfoje plenumis sian funkcion. Mi dankas la Fondaĵon Marelli por la oportuneco al mi donita.

Vojaĝo al Vjetnamujo (2)

Michael Boris Mandirola

Ne estis vere mia unua Universala Kongreso, sed la okuloj de nova volontulo vidas certe ion malsaman ol plurjara internacia aktivulo. Kaj nome ne estis mia unua fojo ekster Eŭropo sed kompare kun Vjetnamujo, la aliaj flankoj de Mediteraneo estas preskaŭ hejmkorto. Do jam plenumitis antaŭkondiĉoj por eksterordinara sperto.

La vojaĝo estis aviadila kaj jam en la eka flughaveno (Zagrebo) min trovis esperantistoj: eĉ sen verdaj insignoj sur mia brusto, esperanta legaĵo tre klare identigis min... antaŭ ol alveni la urbon de la UK mi jam estis en Esperantujo! Vjetnamujon mi tamen ankaŭ sentis sufiĉe tuj: en la taksio el la flughaveno mi povis sperti la vjetnaman trafikon: dekstraj preterpasoj, riverfluo da motorcikloj, komunikado per aŭtomobilsonorilo kaj percepto de trafiklumoj kiel urbaj ornamaĵoj sukcesis ŝoki eĉ italon, la unua tago finiĝis per (onte kutima) vespermanĝo: sidante sur plastaj seĝoj (porinfangrandaj) manĝante iun viandon konservitan ekstermalvarmuje. La unua el longa serio da kontaktoj kun la vjetnama kulturo, la plej forta

kaj interesa tamen estis en la organizo de IJK. La semajnon post la UK, okazis same en Hanojo la IJK; la neapartsperta sed bonvolema organiza teamo profitis do multe por kunsidi inter kerna organiza teamo kaj la ĉeestantaj ĉefaktivuloj de TEJO (gesamideanoj Manuela Ronco, Paweł Fischer-Kotowski kaj Natalia Antolak). Malbedaŭrindas ke Vjetnama E-Junularo estas preskaŭ virina afero: la junularan programon de la UK kaj la IJK-on organizis junulinoj tre entuziasmaj kaj

faremaj. Ili, malgraŭ ĝenerale malalta lingvonivelo, estas ekstreme ĉarmaj, babilemaj kaj amikemaj. Tio tamen ne miskomprenigu ĉar la ideoj pri suda Azio kiel seksa paradizo tute ne akordiĝas kun ilia ĉasteco.

Labori flanke al ili estis plezuro sed ankaŭ grandega defio ĉar niaj kulturaj diferencoj inter eŭropanoj kaj vjetnamoj grandegas. Konkretaj ekzemploj estas la graveco de la oficiala ceremonia programo (kiel fermo kaj malfermo) kompare kun tiu de la nokta programo (trinkejo



La Solena Malfermo



La aŭtoro deĵoras ĉe la Movada Foiro

kaj gufuĵo), la bezonata percepto festumi aŭ ĉu akcepteblas ke tri homoj estu loĝigitaj en dulita ĉambro.

Multaj homoj profitis la ŝancon turismumi en ĉarma lando Vjetnamujo, persone mi elektis la tiel nomatan "Parfuman Pagodon". Ĝi atingeblas per rivera remboatado kaj ĉarma promenado (aŭ kablovoĵumado) tra tropika arbaro. Naturo tie speciale belegas sed la ĉefa pagodo mem ne vere estas elstaraĵo. En ia alta kaverno, troveblis koloraj statuetoj sur ege kiĉaj altaretoj kun elektraj lumoj en kiuj la "oferoj" ofte konsistas el biskvitoj aŭ eĉ boteletoj da vodko en etoso inter la ĉinaĵvendeja kaj la elektrobilardeta.

Ankaŭ laŭ la movada vidpunkto estis tre intensa kongreso por mi. Jam de kelkaj jaroj, mi agadas internacie (mi nun estas vicprezidanto de TEJO), kaj mi ofte havis oficialan rolon en kelkaj movadaj programeroj. Tial por mi estis ege interese partopreni aktive movadegajn programerojn kiel la komitatkunsidon de UEA kaj ties

laborgrupojn (aparte la eksterrilatan kaj gvide la junularan) kaj la strategian forumon. Lige al mia eksterrilata laboro en TEJO estis tre interesaj ankaŭ la programeroj pri UN: prelego en la kleriga lundo kaj pli konkreta kunveno pri esperantagado en UNESKO kaj UN. Malpli movade sed tamen persone sufiĉe grava estis mia partopreno en la Oratora Konkurso kie mi gajnis la unuan premion.



La aŭtoro kun aliaj partoprenantoj en la Oratora Konkurso

Nome de IEF mi partoprenis en la movada foiro (iom kune kun TEJO) kaj mi partoprenis en la prezentado de la Kongresoj en Italujo, kie ni traktis bonimpresdone kaj la Mazaran kaj la Kastelaran; niaj kongresoj fakte gajnis ĉiam pli vastan ŝaton kaj logon en la monda esperantistaro. Ankaŭ parto de mia prelego en la kleriga lundo estis nome de IEF. Ja dum ĝi mi dufoje prelegis (kun samideano Francesco Maurelli), unue pri agado ĉe neesperantaj organizoj (kiel estrarano pri Eksteraj Rilatoj de TEJO) kaj due kiel estrarano de IEF pri kunlaboro kun lokaj institucioj prezentante bonekzemple la sperton de Mazara.

Mi estas esperantisto kaj mi estas eŭropano, sed post UK en Vjetnamujo mi povas diri ke ambaŭ tiuj ecoj eĉ pli fortiĝis kiel fundamenta parto de mia persona identeco kaj mi tre ĝojas ke IEF donis al mi ŝancon travivi tiun sperton kaj mi esperas ke aliaj junuloj havos mian saman ŝancon kaj Esperantan agademom.

INFORM@DIKO

PIV finfine enretigita

Daniele Binaghi

Finfine, la momento alvenis: la Plena Vortaro, tiu dika publikaĵo de SAT, kiun respektindaj geesperantistoj kun sufiĉe da mono en siaj poŝoj kaj sufiĉe da spaco sur sia librobreto neniam kaj neniel maltrafus, finfine estas uzebla (senpage, kaj senbrete!) de homoj per interreto, ĉe la facile memorebla retadreso www.vortaro.net (nu, pli korekte: <http://vortaro.net/>).

Iom da historio

Kiel multaj jam scias, la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (mallonge PIV) estas la plej ampleksa unulingva difinvortaro de Esperanto, kompilita de granda teamo de esperantologoj kaj fakuloj. La antaŭulo de PIV estis Plena Vortaro (PV 1930/1934), kompilita de Émile Grosjean-Maupin (ĉefredaktoro) kaj aliaj. Sub la ĉefredaktorado de lia disĉiplo Gaston

Waringhien estiĝis PIV kaj eldoniĝis unuafoje en 1970. Poste aperis du senŝanĝaj represoj, en 2002 kaj 2005. En la somero de 2010, E@I (la fama entrepreno malantaŭ multaj interretaj projektoj, kiel ezemple lernu!) informis pri sia kontrakto kun SAT, laŭ

kiu la enhavo de PIV 2005 estu konsultebligota en la interreto. Post sukceso de monkoklekta kampanjo, per kiu ĝis majo 2011 kolektiĝis la bezonata sumo de 10.000 eŭroj, E@I realigis la projekton kaj beta-versio de reta PIV estis lanĉita la 4-an de aprilo 2012.



Gaston Waringhien staranta malantaŭ la stako de la manuskripto de PIV

La vortaro

Por uzi la vortaron, oni devas ensaluti. Tio sufiĉe strangas, ĉar verŝajne temas pri la sola vortaro de Esperanto kiu postulas tion. Fakte, temas pri peto de SAT, kiu kompreneble ne deziras ke la tuta enhavo de la vortaro estu elŝaltita pere de automataĵoj. Kaj, se oni jam posedas salutkonton ĉe iu el la paĝaroj de E@I, ekzemple ĉe lernu!, oni povas simple uzi la samajn datumojn; male, oni devas registriĝi, sed tutfacile kaj tutrapide. Ensolutinte, la serĉilo aktiviĝas, kaj oni jam povas entajpi la

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

Sugesto: tajpu laŭ x-sistemo aŭ uzu verajn supersignojn.

ital^o. Civitano de Italio 2.

itala. Rilata al italaj aŭ al Italio: *la itala Renesanco*; *la itala muziko*; *la itala lingvo*.

Italio, Italujo

- 1 ☀ Longa duoninsulo etendiĝanta sude de Alpoj, inter Adriatiko k la Tirena maro.
- 2 Σ Regno, konsistanta el tiu duoninsulo, Sardinio k Sicilio (Romo).

italigi

- 1 Doni la italan karakteron al io: *malitaligi nian lingvon*^Z.
- 2 Trudi la italan lingvon al regiono.

italismo. Apartaĵo de la itala lingvo.

Italio aŭ Italujo? Eterna dilemo...

vorton, kiun oni serĉas. La sistemo nin helpas, proponante vortojn dum ni entajpas; komencante ekzemple per ITALI, oni povos elekti inter Italio, italigi, italismo, Italia senao (brasiko, kukurbo kaj setario!). Interese, oni povas uzi kaj rektajn supersignojn kaj la x-metodon: literoj sekvitaj de X estos tuj aŭtomate tradukitaj al la korespondantaj supersignaj. La premo de la butono Serĉi, aŭ la elekto el la listeto pri kiu mi parolis supre, donos siajn rezultojn tuj sube, per klare legeblaj literoj. Kaj simboloj, ĉar PIV famas ankaŭ pro siaj simboloj. Do, jen informo pri la Numero de la Oficiala Eldono (la 8 kiu troviĝas inter "I" kaj "talio"),

pri la kategorio de la vorto (suno kun montoj = geografio; greka sigma = politiko), pri la aŭtoro de iu citaĵo (L.L. Zamenhof, post "malitaligi nian lingvon"); ĉiu simbolo estas klarigita simple suprenirante ĝin per la musmontrilo, do ne necesas parkerigi ilin ĉiujn (aŭ serĉi en aparta paĝo, kiel okazas ĉe la papera versio de la vortaro).

Estonteco

La projekto de reta PIV aldone havu pli altajn ambiciojn ol esti nur simpla cifereca versio de la papera eldono. La retejo enhavu forumon por ĉiu unuopa vorto, kiu ebligos diskuton pri diversaj terminoj. Tiel ĉiu uzanto povos kontribui,

proponante eblajn novajn esprimojn, taŭgajn uzajn de certaj vortoj ks. Laŭ la plano la retejo estu estonte uzebla ne nur per komputiloj, sed ankaŭ per poŝtelefonoj. Ĉu ĉio ĉi okazos, ankoraŭ ne klaras, same kiel ne klaras kiam la retejo eliros de sia "beta" stato kaj iĝos oficiala. Sed, almenaŭ laŭ tio kion diris Jevgenij Gaus en intervjuo kun Libera Folio, "la baza funkciado de la vortaro estos senpaga por la uzantoj", kvankam "sendube estas pluraj ideoj" por eventualaj pagendaj servoj, elŝutoj aŭ similaĵoj. Tutkompreneble, mi aldonus, ĉar ne ĉio ĉiam povas esti senpaga...

DIRU TRIDEK TRI! Prezidento *sarai tu...*

Renato Corsetti

...e tutta la razza tua fino alla settima generazione!

Ĉu Zamenhof estis viro aŭ virino? Se oni rigardas la bildojn, en kiuj li havas barbon, ni ĉiuj emas pensi, ke li estis viro. Jes, li estis viro, sed li rezonis kiel virino. Bonŝance por ni kaj por Esperanto.

Zamenhof krome ne estis lingvisto sed nur ŝatanto de lingvoj. Vidu tion, kion sukcesis atingi en ĉi tiu kampo monde konataj lingvistoj, kiel Jespersen, Martinert kaj multaj aliaj. Li do, ne estis lingvisto kaj rezonis la virina logiko, per intuicio.

Ekzemple, Esperanto naskiĝis en Eŭropo, sed Zamenhof ne volis ĝin lingve hind-eŭropa. Neniu sanmensa lingvisto estus povinta pensi ion tian. Tamen li skribis: "Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn..." kaj poste diras, ke en la vortaro tiuj vortopecoj aperas ĉiam senŝanĝe. "Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj... tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto

estas tute senbezona), li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo."¹ Poste li donas la ekzemplon de la vorto "fratino", kiu konsistas el tri sendependaj pecoj: frat, in kaj o. Ĉiu, kiu posedas vortaron, kaj trovas tiujn senŝanĝajn pecojn, laŭ Zamenhof, povas kompreni la vorton: temas pri frato, kiu estas ino.

Kial mi parolas pri tio, rilate al "prezidento", bela vorto, kiu similas plurajn eŭropajn lingvojn? Mi parolas pri tio, ĉar la enkondukinto de tiu nova vorto, apud la tradicia "prezident-o", neniam legis la enkondukon de la lernolibro, kaj do li pensis, ke temas simple pri nova radikoj, tre utila por distingi la ŝtatprezidantojn de la prezidantoj de lokaj Esperanto-grupoj. Nia enkondukinto ne komprenis, ke eble la sola afero laŭesperantisma estus uzi la vorton "studanto" por "studento". En la praktiko nia enkondukinto faris duan eraron: temas pri la supozo pri la neceso distingi inter du similaj konceptoj.

Nun, la problemo estas ke pri tio, kion oni distingu aŭ ne distingu, la unuopaj lingvoj kaj homoj havas malsamajn opiniojn. Ĉiuj konas la problemon de la itala

casa tradukata en la angla per du vortoj laŭ la kunteksto: home kaj house. Kiu pravas? Verŝajne ambaŭ pravas, ĉar malsamaj lingvoj dividas malsame la realon. En kelkaj lingvoj estas nur unu vorto por la koloroj "verda" kaj "blua". En la angla oni ne povas distingi "*scarpe grigie*" da "*scarpe marroni*". Tio eble instruas al ni, ke en Esperanto oni ne aŭtomate supozas, ke oni bezonas distingon. En la okazo de "prezidento" la nenecese de la distingo estas klare montrebla per la fakto, ke nun la ĝenerala vorto emas fariĝi "prezidento" ankaŭ por la prezidanto de la loka klubo en "Abbiategrosso". Evidente la homoj ne sukcesas teni la du konceptojn aparte.

Sed ĉu fakte temas pri zorgo pri distingado aŭ ĉu temas pri emo al eŭropigado de la vortostoko de Esperanto?

Eble ambaŭ. Vidu la ekzemplojn, kiuj sekvas.

"Presi / printi"

Kiam aperis komputiloj oni provizis ilin per iloj, per kiuj oni povas presi tion, kion oni skribis. En la angla oni nomis tiujn ilojn "presiloj" (tio estas "*printers*"). En la unuopaj lingvoj oni sekvis tiun modelon, eventuale post iom

da hezitoj. En la itala oni diras “stampante”, kvankam foje oni aŭdas de ŝikuloj “printerina”. Kial en Esperanto oni devis enkonduki la novan radikon “print-i” apud la ekzistantan “pres-i”? Neniu scias. La enkondukitoj argumentas ke temas pri malsamaj procedoj, sed eble la vero estas, ke oni volis anstataŭigi la latinidan “presi” per la angla “print-i”, kiu sonas pli angle kaj pli moderne. Jam Ibn Ĥaldun, araba sociologiisto de antaŭ multaj jarcentoj, diris, ke la venkito ĉiam volas simili la venkinton, en la vestoj, en la lingvo, ktp. “Kruro/gambo”

En la Universala Vortaro surtronas la vorto “krur-o” latindevena. Tio ne plaĉis al kelkaj, kiuj komencis diri, ke oni distingu la supran parton de la malsupra parto de la kruro, do, ni havu “kruro” kaj “gambo”. La fina celo estas anstataŭigi la vorton “kruro” per “gambo”, kio estas jam duonoj.

“Besto / animalo”

El la Universala Vortaro la linio estas:

best' - animal | beast | Thier | животное | zwierzę.

Kiel oni povis pensi pri la neceso distingi inter “animalo inkluzive de homo” kaj “animalo sen homo” restos mistero, pri kiu la enkondukinto de tiu vorto respondos rekte al Sankta Petro en la Tago de la Lasta Juĝo.

“Plaĝo / strando”

En la 30-aj jaroj de la antaŭa jarcento akris la batalo inter francaj kaj germanaj radikoj. Oni tiel manovris, ke oni sukcesis

enkonduki la vorton “plaĝo” por precize la sama signifo de “strando”. Nun oni provas pravigi sin per tio, ke ĉe strando oni ne rajtas bani sin.

“Razeno/gazono”

Precize sama procedo!

Sed la historio ne finiĝis. Nun estas anglalingvaj radikoj, kiujn oni provas uzi konkurence al jam ekzistantaj neanglaj radikoj.

Bonvolu atenti nur per la jena listeto el <http://www.bonalingvo.org>:

biznes-o → komerc-o, negoc-o
blam-i → kulp-ig-i, riproĉ-i
blokhaŭs-o → (mal-grand-a) fortik-aĵ-o; kiras-it-a paf-ej-o
bluf-i [9oa] ~ ŝajn-ig-i (en kartoludo), mensog-e tromp-i
bluĝin-o → (blu-a) ĝinz-o;
ĝinz-o-ŝtof-o
bob-o → sport-glit-vetur-il-o, sport-sled-o
briz-o → vent-et-o
brodkast-i → dis-send-i (per radi-o, televid-o)
brunĉ-o → fru-tag-manĝ-o, maten-tag-manĝ-o,
mez-maten-manĝ-o
bukmekr-o → vet-perist-o
buldoz-o ~ ŝov-traktor-o,
fos-vetur-il-o²

Resume:

1 – Esperanto estas lingvo aglutina pli ol fleksia
Jen la idealo de Zamenhof el la 42-a ekzerco de la Fundamento: Sano, sana, sane, sani, sanu, saniga, saneco, sanilo, sanigi, saniĝi, sanejo, sanisto, sanulo, malsano, malsana, malsane, malsani, malsanulo, malsaniga, malsaniĝi, malsaneta,

malsanema, malsanulejo, malsanulisto, malsanero, malsaneraro, sanigebla, sanigisto, sanigilo, resanigi, resaniĝanto, sanigilejo, sanigejo, malsanemulo, sanilaro, malsanaro, malsanulido, nesana, malsanado, sanulaĵo, malsaneco, malsanemeco, saniginda, sanilujo, sanigilujo, remalsano, malsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsanulista k. t. p.

Se vi volas diferencigi inter prezidantoj, diru: ŝtat-prezidanto, asoci-prezidanto, klub-prezidanto, ktp.

Ne inventu novan radikon! Esperanto estas lingvo alga.

2 – Esperanto estas lingvo tutmonda kaj ne nur eŭropa

Se vi volas enkonduki novan radikon por ŝtat-prezidanto, unue esploru kiel oni diras en la ĉina, japana, indonezia, araba, ktp.

Esperanto estas tro multe vortare eŭropa. Ne necesas pliiĝi tion.

3 – Esperanto estas lingvo facila

La sola forto de Esperanto estas la ideo malantaŭ ĝi pri egaleco inter ĉiuj lingvoj kaj ĉiuj popoloj. Alia forto estas ĝia facileco. Se vi forprenas tion, vi faras grandan servon al la malamikoj de Esperanto.

4 – Esperanto estas lingvo regula

Alia forto de Esperanto estas ĝia reguleco. Pro ĝi oni lernas ĝin pli rapide ol oni lernas aliajn lingvojn. Se vi forprenas tion...[kiel supre].

1) Zamenhof, L. L., Unua libro de la lingvo Esperanto en Fundamenta Krestomatio, Parizo, Esperantista Centra Librejo, 12-a eldono, paĝo 248.

2) En ĉi tiu ekzemplo vi povas ignori la diferencon inter sago kaj ondo-signo kaj ankaŭ la aliajn indikojn krom la vortojn mem.

Esperanto per negati (2)

Pier Luigi Cinquantini

Nel mio contributo del precedente numero ho parlato, tra l'altro, di una parola molto diffusa in esperanto, specie tra i principianti, ma non solo: si trattava di *konatulo*, quando basterebbe dire *konato*. Questa volta ne aggiungiamo altre due, che potremmo comparare all'"attimino" in italiano, o all'"assolutamente" usato isolatamente. Si tratta di *Ekde* e *Dankema*.

Ekde


In esperanto c'è la preposizione *de* che indica il punto del tempo dove inizia un'azione. Per la maggioranza degli usi questa preposizione è più che sufficiente per dare delle informazioni: *Eiŭro komencis cirkuli de 2000; mi laboras de tri tagoj; De hieraŭ mi ne plu fumas; ktp.* A volte però abbiamo bisogno di informazioni più precise, in quanto il punto non è preciso e vogliamo sapere di più. Magari volete sapere precisamente quando l'euro ha iniziato il suo corso, e usando solo *de* non è abbastanza chiaro. A questo punto ci vengono in

soccorso due ulteriori espressioni che indicano il punto in cui inizia l'azione: *Ekde* e *De post*. Queste espressioni si usano quando il "punto" ha una durata: un anno è lungo 365 giorni e a volte ci serve di sapere precisamente se l'anno è incluso nella risposta oppure è "a partire dalla fine". Quindi se vogliamo precisare che l'anno 2000 è compreso diremo: *Eiŭro komencis cirkuli ekde jaro 2000a* (dal 1° gennaio 2000); se vorremo invece escluderlo diremo *de post jaro 2000a*. Si veda l'illustrazione. Nel momento in cui parliamo di un punto, senza durata, usare una delle due preposizioni non ha molto senso, ad es.: *ekde nun, ekde tiam, ekde la unua horo; ktp.* L'esperanto è logico ma non matematico e, principalmente, è vivo, e così possiamo usare queste espressioni solo se vogliamo enfatizzarle: vostro figlio si è comportato male e voi lo punite non facendogli guardare la TV? *Ekde nun vi ne rajtos rigardi televidon.* Ancora: *Ekde la naskiĝo de nia filo, ni ne plu iras manĝi en picejon (nun e*

naskiĝo sono dei punti e basterebbe dire *De nun, o De la naskiĝo*, ma vogliamo rafforzare l'idea di inizio, e perciò usiamo *Ekde*). Purtroppo ormai molto spesso *ekde* viene usato al posto di *de* senza un vero bisogno e ciò farà perdere alla lingua uno dei suoi numerosi strumenti di espressività.

Dankema

Su *dankema* la situazione è più semplice: spesso si usa questa parola al posto di *danka*. Per dire "grato" basta dire *danka*; Se mi accompagni al cinema te ne sarò grato – *Se vi akompanos min al kinejo mi estos danka al vi.* *Dankema* significa incline a ringraziare, essere grato, riconoscente. Quindi si capisce che essere *dankema* a qualcuno solo perché ci ha accompagnato al cinema è un po' esagerato, ma se qualcuno ci aiuterà, ad esempio, a trovare lavoro potremo dire tranquillamente: *Mi estos dankema al vi por tuta vivo.* Si tratta di sfumature che però aiutano la lingua a non appiattirsi. In ogni caso una volta che sarete coscienti della sfumatura sarete liberi di usare la qualità che più vi aggrada a seconda delle circostanze che vi capiteranno.



KONGRESO

Mazara del Vallo

Liba Gabaldi

Ĉi-jare estis elektita Sicilio por kongresi. Suno, maro kaj Esperanto altiris multajn geesperantistojn el kvin kontinentoj. La kongreson partoprenis pli ol 330 samideanoj el 32 landoj. La itala nacia kongreso fakte fariĝis internacia. La kongreso okazis ĉe la mediteranea marbordo en multkultura urbo Mazaradelvalo. Mazara havas pli ol 51 000 enloĝantojn. Ĝi situas en la provinco Trapanio. En ĝia historia urbocentro troviĝas multaj preĝejoj kaj aliaj historiaj konstruaĵoj. Tre agrabla estas promeno en la araba kvartalo tra mallarĝaj stratetoj kun domoj surmure ornamitaj per fajencaj bildoj. Dum la kongreso aldoniĝis fajenca ornamaĵo pri Esperanto farita de lernejoj de la Arta liceo. Ni kongresis en hotelo "Hopps". Multaj el ni ĝuis la hotelan naĝejon aŭ Mediteranean maron. Pro granda varmeco la homoj posttagmeze siestas. La urbo revigliĝas vespere ĝis malfruaj noktohoroj. Amaso da afiŝoj pri prezentadoj por la publiko kaj pluraj surstrataj banderoloj anoncis la kongreson. La enloĝantoj havis eblecon "gustumi" Esperanton propraorele kaj propraokule dum ĉiutagaj vesperaj koncertoj.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro de la kongreso. Unue la membroj de la LKK - Bruĉjo Kasini kaj la prezidanto de Itala E-Federacio Aldo Grassini bonvenigis nin. Sekvis paroladoj de profesoro Khaled Fouad Allam pri interkulturo kaj la festparolado de Barbara Pietrzak la ĝenerala sekretariino de UEA. Intertempe venis la urbestro, s-ro Nicoló Cristaldi kiu entuziasme bonvenigis nin kaj poste sekvis kutimaj salutoj de E-institucioj kaj de reprezentantoj el diversaj landoj. Post la E-himno la kongreso estis malfermita. La urbestro tre favoras disvastigon de Esperanto. En Mazara estis starigita Centro por Esperanto kaj Interkulturo. Ĝi celas disvastigon de la lingvo en la lernejoj. Jam antaŭ la kongreso pli ol 500 homoj (ĉefe lernejoj, studentoj kaj instruistoj) sekvis entuziasme kurson de Esperanto. La instruado daŭros ankaŭ estonte. La temo de la kongreso estis "Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof". Ĝi estis pritraktita en du seminarioj gvidataj de Kristin Tytgat kaj Elizabeth Schwarzer. La riĉa programo proponis prelegojn, seminariojn, trinivelajn E-kursojn kaj ankaŭ rapidan kurson de la itala lingvo. Katalin Kováts gvidis

intensan trejnseminaron por instruistoj kaj instruantoj de Esperanto. Ŝi ankaŭ zorgis pri KER-ekzamenoj kaj disdonis diplomojn al sukcesintoj de antaŭaj ekzamenoj. Ne mankis libroservo, ekspozicio pri Esperanto, prelegoj kun aperitivo por la publiko, promeno tra la urbo kun la urbestro, kantado kun duopo Ankie kaj Nanne de la muzikgrupo Kajto, mediteraneaj vesperoj kun Davide Astori, noktaj junularaj mojosaj programeroj, animitaj de talenta italo Michael Boris Mandirola. Same kiel lastjare okazis Verda Foiro, kaj eblis aĉeti filatelajojn kun poŝta stampo de la kongreso. Sur la ĉefa placo oni starigis podion, kie niaj plej elstaraj kantistoj kaj muzikistoj havis eblecon vespere prezenti koncertojn. Inter la plej famaj estis JoMo, Kim kaj ensemblo Kajto. Ĉiuj havis grandegan sukceson kaj plurcentan publikon. Ankaŭ sur la strandoj aperis kelkaj lokaj muzikantoj, kiuj plezurigis laŭstrandajn promenantojn kaj eĉ instigis iujn al dancado surtrotuare. Al buntaj muzikaj vesperaj programeroj kontribuis impresa mezepoka prezentado de sicilia historio en formo de parado. Bela spektaklo de dancoj, teatrecaj movoj en

historiaj kostumoj. Oni komencis ĝin el tempo de grekoj, sekvis araboj, normanoj kaj tiel ĝis nuntempo. La procesio estis spektata kaj forte aplaŭdata de homoj starantaj sur plenŝtopitaj trotuaroj ambaŭflanke. Alia nokta procesio temis pri la religia parado por Sankta Vito. En la internacia vespero oni multe kantis, gitar- kaj flutludis, deklamis, teatrumis. La etoso estis gaja.

Tre allogaj estis multnombraj ĉiutagaj ekskursoj al diversaj

lokoj ligitaj kun la prahistorio de la okcidenta parto de Sicilio. Ni ĝuis vizitojn al la urboj: Palermo, Agrigento kaj la Valo de la Temploj - Erice, salmarĉoj kaj Trapani - Salemi, Sciacca, Sambuca. Interesaj estis la templo kaj amfiteatro en Segesta kaj la temploj de Selimunte. Dum tiuj ekskursoj ni vizitis kelkajn muzeojn: pri konkoj, pano, salo, tinuso. Pluraj ceramikaj vendejoj ravis nin kaj ankaŭ vizito de teatro. Koncerne Sicilion oni ofte pensas pri mafio. Ni ne renkontis

mafianojn (feliĉe!), sed ni havis okazon viziti muzeon pri mafio. Ni ŝipekursis al la insulo Flavignan. Iuj preferis biciklajn ekskursojn kaj promenojn. Ĉie ni renkontis afablajn homojn, kiuj ŝatis paroli kun ni kaj iuj eĉ interesiĝis pri Esperanto. La etoso estis varmega same kiel la vetero. La venonta, jubilea itala kongreso okazos en Liguria en Kastelaro proksime al San Remo. Tie estos nova okazo ĝui interesan E-aranĝon kaj krei novajn amikajn kontaktojn.

Ancora Mazara del Vallo

Amerigo Iannacone

Storia, arte, mare, sole, ospitalità, buona cucina. Siamo a Mazara del Vallo per il 79° Congresso Italiano di Esperanto che si è svolto dal 17 al 25 agosto, con 328 partecipanti. Congresso italiano, ma almeno la metà dei congressisti proveniva dall'estero e non solo dall'Europa ma tutti e cinque i continenti, perfino dal Brasile, dal Canada, dal Madagascar, dall'Australia, dalla Russia, dalla Corea del Sud, dall'Angola, dal Costa Rica, ecc.

Tema del Congresso "Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof" (ma persone con persone: l'intuizione multi-etnica di Zamenhof). L'espressione è una citazione dal discorso inaugurale di Ludwik Lejzer Zamenhof, l'iniziatore dell'esperanto, al Primo Congresso Universale di Esperanto tenuto in Francia, a Boulogne-sur-Mer, nel 1905.

«Ni konsciu bone – disse allora tra l'altro Zamenhof – la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de

Bulonjo-sur-Marò kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.» (Dobbiamo essere ben coscienti di tutta l'importanza della giornata odierna, perché oggi tra le ospitali mura di Boulogne-sur-Mer sono convenuti non francesi con inglesi, non russi con polacchi, ma persone con persone.)


A Mazara, fin dai primi contatti, il comitato organizzatore del Congresso ha trovato nel Sindaco Nicolò Cristaldi non solo grande disponibilità, ma un'adesione entusiasta agli ideali esperantisti, che ben si sposano con le caratteristiche di una città multi-etnica e multiculturale, ospitale e aperta, come Mazara del Vallo. Una città che il Sindaco stesso auspica possa diventare città-simbolo dell'esperanto.

Numerose le attività congressuali (relazioni, corsi di lingua per principianti e corsi avanzati, spettacoli teatrali, concerti, relazioni su vari temi, convegni, ecc.), ma non sono mancate escursioni

nelle bellissime località della Sicilia occidentale, da Marsala ad Agrigento.

Tra le attività, collegate al Congresso o da esso suscitate, corsi di esperanto tenuti in tutte le scuole di Mazara, cui hanno partecipato più di 500 studenti e nuovi corsi sono programmati per l'anno scolastico 2012/2013.

Molto importante, poi, è stata la pubblicazione di un'antologia di scrittori e poeti siciliani, Luigi Pirandello kaj aliaj Siciliaj Aŭtoroj (L. P. e altri autori siciliani). Un'antologia, 356 pagine, di notevole pregio, curata da Carlo Minnaja, con traduzione di vari scrittori esperantisti, oltre che da Pirandello, da Capuana, Quasimodo, Verga, Rosso di San Secondo, Buttitta, Brancati, Vittorini, Sciascia, Lampedusa, Camilleri, Consolo, Bufalino, Dolci, De Roberto, Rapisardi. L'80° Congresso Italiano di Esperanto, si terrà a Castellaro (IM), nei pressi di Sanremo, nell'agosto 2013.



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

